

Sed kion pri la estonteco? Kompreneble nia unua tasko estas rekolekti la membrojn, reenfluigi la kotizojn kaj tiel certigi la regulan aperadon de SCIENCA REVUO. La estraro ankoraŭ diskutas, ĉu transsalti la jarkolektojn por 1979 kaj 1980 kaj kompense liveri al la membroj iujn aliajn publikigaĵojn kun rilato al scienco, aŭ ĉu aperi iom reduktitajn jarkolektojn por tiuj du jaroj. Plie ekzistas planoj pri pretigo de varbiloj kaj de membrolisto aŭ jarlibro. La estraro ankaŭ diskutas pri okazigo de sciencistaj simpozioj kaj pri aperigo de sciencaj lernolibroj aŭ aliaj sciencaj verkoj en Esperanto.

Kiel vi vidas, taskoj abundas. Mi invitas ĉiujn esperantistajn sciencistojn al efika kunlaboro por realigi tiujn kaj aliajn planojn.

Kolege salutas vin

C. Stop-Bowitz
prezidanto de ISAE

Notoj de la ĉefredaktoro

Referencante al SR, 1978, 1, 8, mi denove petas, ke ĉiu aŭtoro, kiu deziras aperi sian traktaĵon en SR, bonvolu atenti jenon:

1. Verki laŭeble pri sia propra originala esplorado tiel, ke ĝin komprenu eĉ alifakaj sciencistoj;
2. Sendi al mi la tekston en 2 ekzempleroj, tajpitaj sur maldika papero;
3. Maŝinskribi normallitere en la tajp-areo de 165 mm × 250 mm, kun la liniado 1½, t.e. kun 40 linioj surpaĝe;
4. Ĉiun vorton neesperantan substreki ondlinie (por la kursiva kompostoj), dum rektlinia substreko signifas komposton dikliteran;
5. En la teksto noti lokojn, kie troviĝu eventualaj figuroj;
6. Ne forgesi referenc-liston;
7. Aldoni koncizan resumon en sia gepatra lingvo.

Ĉar SR strebas al perfekta faklingvo, mi supozas, ke la verkontoj zorge trastudos koncernan materialon, ĝis nun aperintan en SR, kaj ke ili kunlaboros kun TC-ISAE.

Anticipe mi dankas pro pacienca kunlaboro.

Sincere via

J. Kavka

INTEL 8080 — priskribo kaj programado

Vortoj de la tradukinto

La sekvantaj paĝoj estas grandparte traduko de du ĉapitroj el la usona libreto "Intel 8080 Microcomputer Systems User's Manual", eldonita en septembro 1975, pri kiu ne ekzistas kopirajtoj. La paĝoj konsistigas la ĉefan parton de enkonduko al la kompreno de funkciado kaj utiligo de la fama konata mikroprilaborilo INTEL 8080.

Mi laboras ankaŭ pri konekto al komputoraj retoj per la proceduro X25, precipe pri la franca, pakkomuta reto TRANSPAC.

Ĉiuj kritikoj kaj rimarkigoj estas bonvenaj. Bonvolu sendi ĉiujn poŝtaĵojn al la adreso de mia oficejo:

Christian Bertin, inĝeniero
C.C.E.T.T., departemento RSI
2, rue de la Mabilais, B.P. 1266
35013 Rennes Cedex, Francio

1. La funkcioj de komputoro

Tiu ĉapitro prezentas iujn bazajn komputajn konceptojn. Ĝi havigas foinformojn kaj difinojn, kiuj estos utilaj en la postaj ĉapitroj de la manlibro. Tiuj, kiuj jam familiariĝis pri komputoroj, povas preterlasi ĝin.

Tipa karaktra komputoro konsistas el:

- centra prilabora unuo (CPU),
- storo,
- enig/elig- (EN/EL) pordoj.

La storon oni utiligas por stori **instrukciojn**, koditajn partojn de informo, kiuj regas la aktivojn de CPU, kaj **datumojn**, la koditajn partojn de informo, kiuj estas prilaborataj de la CPU. **Programo** estas grupo da logike ligitaj instrukcioj, storita en la storo. CPU legas ĉiun instrukcion el la storo laŭ logike determinita sekvenco kaj uzas ĝin por startigi prilaborajn agojn. Se la programsekvenco estas kohera kaj logika, la efektivigo de la programo produktos kompreneblajn kaj utilajn rezultojn.